



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Uzu Esperanton

praktike!
Aŭskultu al la
Esperanto-
elsendoj!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 36/1976 - 6 sep 1976
Aperas ĉiusemajne

Pri la Esperanto-agado en Italio

Massa (pp) - Okaze de la Itala Esperanto-Kongreso, kiu okazos en la Toskania urbo Massa C. de la 19-a ĝis la 24-a de septembro, la Itala Esperanto - Federacio havigis al siaj membroj raporton pri la agado dum la asocia jaro 1975/1976. Ni tradukas la plej interesajn erojn de tiu raporto:

"La nombro de la membroj praktike ne ŝanĝiĝis: fine de junio 1976 ili estis 1644 (el kiuj 263 junaj), kompare kun la 1636 (el kiuj 260 junaj) fine de la pasinta jaro. Ekzistas 46 grupoj; la plej multenombraj estas tiuj de Trento (139 membroj), de Milano (134) kaj de Bolonjo (106).

La sekretariejo daŭrigis sian laboron, ne tuj rimarkeblan sed efikan; depost la pasintjara kongreso, la Federacio ricevis 650 informpetojn, al kiuj oni regule respondis.

Dank' al trafa varbkampanjo, oni spertis bonan sukceson ĉe la vendo de la kurso por memlernantoj "Esperanto programita" en la itala, kaj praktike elĉerpiĝis ĉiuj lernolibroj en la itala, pri kiuj oni disponis; oni reformis la stokojn por la venontaŭtunaj kursoj, kaj samtempe oni preparas novan lernolibron. Daŭre sentigas la malfacilaĵoj devenanta el la manko de kompleta vortaro itala-Esperanta, tamen la laboro por la aperigo de tia vortaro jam estas preskaŭ ĉe la fino; la manuskripto de la vortaro siatempe verkita de prof. La Colla, donacita de lia vidvino al la Itala Esperanto-Federacio, jam estis komplete reviziita unu fojon; komisiono jam reviziis duan fojon pli ol duonon de ĝi, kaj jam komenciĝis la laboro por pretigi tekston en formo taŭga por presado.

La revuo "L'Esperanto" aperis en vesto modesta sed inda. Ĝia enhavo donis lokon al dokumentoj en la itala pri temoj koneksaj kun la Esperantista kulturo kaj kun la sociaj implikoj de la uzado de Esperanto; tio signifis apartan atenton al la situacio de minaciataj minoritataj lingvoj.

En la eldona kampo, aparte estis sukcesa la aperigo de kajeroj en la itala lingvo pri difinitaj temoj, senpage senditaj al la membroj kaj al 1 500 neesperantistoj en influaĵaj pozicioj. Pro la kromaj aĉetoj fare de interesitoj, oni eĉ devis repressi la unuan kajeron (pri "La instruado de fremdaj lingvoj en elementa lernejo - alternativa eksperimento") kaj la duan kajeron (pri "La danĝeraj lingvoj"), atingante suman eldonkvanton de 8 000 ekzempleroj. La tria kajero (pri "Internacieco de kulturo. Lingvaj kaj pedagogiaj aspektoj") aperis antaŭ nelonge.

En la kampo de rilatoj kun la ekstera mondo, menciindas la pasintjara Nacia Kongreso en Triesto, seminario en Bardolino pri la instruado de fremdaj lingvoj en la devigaj lernejoj, la Internacia Konferenco de ILEI en San Marino (sendependa respubliko, tamen al Italujo ligita en la kultura kampo), kaj multnombraj lokaj kaj regionaj aranĝoj. Krome, ankaŭ ĉi-jare la Itala Esperanto-Federacio oficiale partoprenis per propra stando la Internacian Specimenfoiron de Milano, kaj Esperanto-standoj ankaŭ ĉeestis en aliaj similaj aranĝoj, ekzemple en la Foiro de Triesto.

Pri la agado en Italio (daŭrigo)

La itala politika situacio ne ebligis fruktodonan daŭrigon de la kontaktoj kun parlamentanoj, samkiel ne estis eble atingi la pridiskuton de la lerneja leĝpropono.

Oni diskonigis al la koncernaj instancoj la rezoluciojn de la kongreso en Triesto, kun aparta konsidero al ĉiuj italaj komunumoj situantaj ĉe landlimo; oni plusendis al la Monda Organizo pri Sano la rezolucion pri la troaj elspezoj por tradukado, kaj tio naskis respondleteron videble embarasitan; oni kontaktis la italan oficejon de Unuiĝintaj Nacioj kaj la italan komisionon por UNESKO, kun la celo starigi kunlaboron okaze de la jardeka kampanjo kontraŭ rasismo; oni ankaŭ pridemandis de la itala ministerio pri eksterlandaj aferoj la oficialan sintenon de la itala registaro koncerne la finan deklaron de la Konferenco de Helsinkio pri kunlaboro kaj sekureco en Eŭropo. Oni komunikis al multnombraj kulturaj instancoj la temojn de la ĉi-jara Nacia Kongreso: "Esperanto en la lernejo por la edukado al la internaciismo", "Esperanto en la eksperimentado antaŭvidita de la ĵusaj leĝoj pri italaj lernejoj", "La kontribuo de Esperanto al la eŭropa kaj internacia eduko"; de la koncernaj instancoj oni petis intervenojn kaj referaĵojn.

Kampo malfermita al la agado de la Esperanto-movado estas la privataj radiostacioj, kiuj daŭre plimultiĝas en Italujo; en Romo okazis pluraj elserĉoj pri Esperanto, aliaj havis lokon en Forlì; en aliaj urboj, ekzemple en Novaro kaj Triesto oni starigis kontaktojn kaj oni pretegas Esperanto-kursojn. Ĉi tiu nova agado ne devas forgesigi la regulan elsendadon en Esperanto de Radio Roma, kaj komenciĝon, kvankam en limigita formo, de Esperanto-elsendoj ĉe Vatikana Radio.

Al la itala Televido oni sendis oficialan peton por debataj elsendoj pri lingvaj problemoj, surbaze de ĵusa leĝo, kiu rajtigas la partoprenon de kulturaj kaj sociaj instancoj en la televidaj programoj.

En la kampo de internaciaj rilatoj, oni flegis kontaktojn kun la Eŭropa Esperanto-Centro, pere de kiu oni ankaŭ disvastigis komentojn kaj rimarkojn pri referaĵo de prof. Janne, farita laŭ komisiono de Eŭropa Komunumaro, pri la temo "Por komunaĵa politiko de edukado". Oni ankaŭ apogis la iniciaton de Kanada Esperanto-Asocio okaze de Olimpikaj Ludoj, liverante al ĉiuj italaj atletoj, kiuj partoprenis la aranĝon, broŝuron kun sportaj kaj ĉiutagaj terminoj en la itala kaj en Esperanto.

Fine, speciala komisiono prilaboris proponon por reformo de la statutoj de la Federacio, pri kiu oni voĉdonos referendumo.

Laŭ Radio Roma, verkita de d-ro Antonio De Salvo.

Pri Esperanto-Kulturo

Varsovio (pp) - Kio estas kulturo? Laŭ PIV kulturo estas "prizorgado kaj perfektigado de la spirita evoluo de homo". Ĉu estas aŭ estu Esperanto-kulturo? Estas konate, ke estas esperantistoj kiuj pledas por Esperanto-kulturo, speciale William Auld. Ankaŭ la nuna prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, je multaj okazoj parolis pri la "florado de Esperanto-kulturo". Kaj ankaŭ jam Zamenhof parolis iam pri la "celoj de neŭtrale-homa kulturo".

Aliflanke estas esperantistoj, inter ili ankaŭ K. Kalocsay, kiuj neas la ekziston aŭ eĉ la bezonon de propra Esperanto-kulturo. Al la neantoj apartenas ankaŭ Fernando de Diego, kiu tradukis kelkajn literaturaĵojn el la hispana en Esperanton. Okaze de restado en Varsovio li donis intervjuon al la Esperanto-redakcio de Pola Radio, intervjuis lin Barbara Pietrzak.

Pri Esperanto-kulturo (daŭrigo)

Je la demando, kiujn fenomenojn de la Esperanto-movado vi opinias plej gravaj, Fernando de Diego, diris, ke la plej grava fenomeno antaŭ ĉio estas, ke Esperanto alproksimigas homojn de diversaj lingvoj kaj kulturoj kaj estas plej taŭga rimedo por ke ni konu unu la aliajn sur sama nivelo de egaleco lingva. Tio mem, li opiniis, pravigas la vivorajton de Esperanto.

Alia demando invtjua tekstis: "Kiun celas laŭ via opinio la Esperanto-Kulturo kaj entute kiel vi karakterizas la Esperantan kulturon?"

"Mi ne scias, ĉu ni povas paroli pri Esperanta kulturo", respondis la intervjuito. Laŭ li la Esperanta kulturo estas la resume de naciaj kulturoj, la perilo de internaciaj karakterizaĵoj. Tio, kion oni skribas originale en Esperanto portas la nacian influon kaj stampon de la verkintoj. "Mi kredas ke ankoraŭ dum multa tempo Esperanto estas perilo de diversaj kulturoj naciaj, propra originala Esperanta kulturo ne estas imagebla almenaŭ dum multa tempo", Fernando de Diego konkludis tiun temon.

Cetere, Fernando de Diego estas akademiano, kaj aparte interesiĝas pri literaturo kaj ĵurnalismo Esperantaj. Li nun finis la tradukon de Don Quijote de Cervantes, kies eldono estos grava evento de la Esperanto-literaturo.

La Vatikano miras

Romo (pp) - Dum la Universala Kongreso en Ateno, la 1-an de aŭgusto, katolikoj ĉeestis meson en Esperanto en la katolika Katedralo de Sankta Dionizio. Partoprenis pli ol 150 personoj el diversaj landoj, malgraŭ la koincido de la aranĝo kun la malfermo de la UK.

Ĉe-estis la meson ankaŭ la ĉefepiskopo de Ateno, Nikolao Foskolos, kiu poste subskribis, kune kun la prezidanto de IKUE, Ĉeslao Biedulski, ĉi tiun telegramon al la Papo Paŭlo 6-a:

"Okaze de 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno, ĉefepiskopo Nikolao Foskolos, pastroj, IKUE-anoj partoprenantaj Sanktan Meson en katedralo de S. Dionizio, tutkore salutas kaj humile petas Apostolan Benon al Via Sankteco, kaj samtempe certigas plenan aliĝon al patraj instruoj de Via Sankteco rilate evangelizadon de nuntempa mondo pere de Internaica Lingvo Esperanto".

Estas kurioze, ke la anstataŭanto de la Ŝtata Sekretario de Vatikano, monsinjoro Benelli, ricevinte la diritan telegramon, kiu estis en la latina, telefonis al pastro Giacinto Jacobitti en Romo, demandante kun mirego, ĉu li bone komprenis, ke efektive ĉefepiskopo partoprenis meson en Esperanto!

Estas aldonende, ke la ĉefepiskopo Foskolos estis inter la unuaj, kiuj dum la Universala Kongreso de Ateno subskribis peton al la Vatikana Radio, por ke la Esperant-lingva anguleto disaŭdigata de tiu stacio estu pli ampleksa kaj okazu en pli taŭga horo. (Laŭ Radio Roma)

Nova ŝanco por Esperanto

Köln (pp) - "Deutschlandfunk", germana radiostacio, disaŭdigis la 16-an de aŭgusto, de 14,10 ĝis 14,30 horo, raporton pri la "Tago de la scienco" en Klagenfurt, dum kiu prof. dr-ro Frank parolis pri komunikaj modeloj kaj pri la rolo de Esperanto. Dum la elsendo kun la titolo "Nova ŝanco por Esperanto", liun verkis Gerd E. Hoffmann, oni ankaŭ aŭdigis parton de la parolado de prof. Frank. En letero al Bertil Englund, Bad Kissingen, la radiostacio skribis, ke oni ankaŭ estonte pritraktos la lingvoproblemon kaj Esperanton, kondiĉe, ke okazas aktualaj sciencaj kunvenoj aŭ similaj.

Esperanto en Radio

Varsovio. La politikaj elsendoj certe kontribuas al la evoluo de la "politika lingvo" de Esperanto, kaj pro la aktualeco la redakcio ofte devas enkonduki novajn esprimojn, por povi esprimi tion, kio necesas. En unu el la pasintaj panoramoj de internaciaj eventoj Varsovio parolis pri la konferenco de Kolombo, do pri la konferenco de ŝtatoj, kiuj ne estas ligitaj unu el la du grandaj blokoj. Unufoje oni parolis pri "eksterblokaj ŝtatoj", alian fojon pri la "novado de ne-engaĝitaj ŝtatoj". Aliaj politikaj temoj lasttempe estis la "fi-reĝimo en Rodezio" kaj la eventoj en la "rasisma Sud-Afriko". - En felietono de Milada Sveto, kadre de leterkesto, la aŭskultantoj eksciis pri artikolo en aldono al la ĉeĥoslovaka gazeto "Rude Pravo", la partia organo, de la 4-a de septembro, pri la lingva problemo. Interesa estis la konstato, ke la "rezervoj rilate al Esperanto estas superŝtiĉo", certe tre rimarkinda fakto! - Plie oni eksciis en unu el la elsendoj, ke la pola gazeto "Trybuna Ludu" en raporto pri la Atena Universala Kongreso speciale elstarigis la fakton, ke la Centra Laborrondo Esperanto de GDR fariĝis plenrajta membro de UEA.

Vieno. En la semajnaj komentarioj de tempo al tempo revenas la problemo de la slovena minoritato en Suda Karintio. Tiele denove komentis d-ro Alfred Macher en la elsendoj de la 28/29 aŭg: "Jugoslavio, agitante en ne plu tolerebla mezuro kontraŭ Aŭstrio, asertas, ke ni subpremas, eĉ minacas ekstermi nian slovenan minoritaton. Ĉiu homo povas laŭplaĉe veni kaj konvinkiĝi surloke, ke niaj slovenoj ĝuas la senkondiĉe samajn rajtojn kiel la aliaj ŝtatanoj. Ili libere uzas sian lingvon en familio, lernejo, tribunalo kaj gazetoj. Neplenumita restas ankoraŭ nur unusola postulo de la ŝtatkontrakto, nome la starigo - en lingve miksita regiono - de dulingvaj vojmontriloj. Ĉar la karintia plimulto kontraŭas ties starigon, timante, ke surbaze de tiaj dulingvaj tabuloj Jugoslavio povus - kiel jam ripete en la pasinteco - postuli cedon de tutaj regionoj. La karintia plimulto postulas, siavice, ke laŭ rezulto de tiucele farenda sekreta popolnombro dulingvaj tabuloj estu starigotaj nur en lokoj kun almenaŭ 25 procentoj da slovenaj loĝantoj. Tiun proponon, same kiel minoritat-favoraleĝon, ĉiuj tri parlamentaj partioj unanime akceptis.

Nur la reprezentantoj de la solvena minoritato ne konsentis al tiu solvo, kiun la jugoslavia agitado komparas eĉ kun la rasismo en Suda Afriko, kvankam Jugoslavio mem postulas ĝuste tian samspecan laŭlingvan nombradon de - Bulagrio!

Ĉu la funkciuloj de niaj slovenoj timas, ke la nombrado povus elmontri la malmultecon de ilia anaro? Ĉiukaze estas tutcerte, ke multaj jugoslavo estus feliĉaj, se ili ĝuus eĉ nur parton de la liberecoj, kiujn posedas la slovena minoritato en Aŭstrio!"

En la leterkesto de la 4/5 sep la Esperanto-redakcio de Vieno diris pri la eldono de Simplicius Simplicissimus jenon: "En bonega Esperanto-traduko, farita de Margot Hektor, Hermann Heiss kaj Fritz Walter Poppeck, prezentiĝas kelkaj specimenaĵaj aventuroj de Simplicius Simplicissimus, heroo de la plej fama germanlingva romano el la 17-a jarcento, kies aŭtoro, Grimmelshausen, mortis antaŭ 300 jaroj en Oberkirch, Baden, Germanio, bela kaj belpejzaĝe situanta urbo, nun renomiginta ankaŭ per sia fervora Esperanto-vivo. La 24-paĝan kajeron eldonis Ludwig Pickel, Nürnberg, Germanio."

Berno. Post la serio de intervjuoj kun prof. R. Wood gesinjoroj Gacond traktis aliajn Esperanto-temojn, la troan eŭropecon de Esperanto surbaze de artikolo en revuo "Esperanto" kaj la biografion pri "Lanti", eldonitan de SAT. D-ro Arthur Baur traktis turismajn temojn.

Romo. Renato Corsetti rakontis pri la UK en Ateno dum la lastaj elsendoj en aŭgusto, oni povis aŭdi la spertojn kaj opiniojn de kongresano.